V-23453/1 (1923r.) N.1-2/

# REVUO KATOLIKA

ALDONO AL KATOLIKA MONDO

NUMERO 1 MAJO 1923 I. KOLEKTO

## La malsana Ruslando.

La slava animo estas mistera enigmo por okcidentuloj. Nur malmultaj, kiuj per longdaŭra kunvivado kun la popolo mem, povis persone esplori tiun profundegan, mistikan, ĉarmegan vivon de la rusa animo, kapablas kompreni la nunajn plej malfeliĉajn cirkonstancojn. Certe tiu sennombra amaso, loĝanta de Baltika ĝis la Nigra Maro ne estas unueca genta organismo. Kontraŭe inter la norda parto ekz. kaj la Ukrajna loĝantaro estas eĉ malamika dispartiĝo. Tamen tiu tuta amaso pli malpli estas penetrata per la slava animo: tiu silentema, korprofunda, sonĝa vivo, kiu ĉiam revante amas la misterojn, alcelas la ekstremojn, la nerealigeblojn.



La kristana karito en Ruslando.

Tiu rusa animo estas malsana. Jen la mistero de Ruslando. Dum centjaroj tiu giganta animo estis katenigata per cara sklaveco. Religie disigita de la viva, agadema, ĉiam antaŭencelanta okcidenta eklezio, tiu laŭnature tre religiema animo estis malhelpata kaj sklavigata per ekstera ŝajno de servema stata eklezio, kiu en siaj superaj rangoj religie pli malpli estis morta kaj nur instrumento de la cara politiko. La rusa religia animo ne libere povis flugi en la dolĉajn kampojn de la religiaj misteroj . . . .


Venis la milito; la revolucio rompis la sklavkatenojn. La rusa animo subite estis libera! Sed kia libereco? Ĉie ruino, morto, pesto, persekutado, malsato. Jes la granda malsato, tiu terurega skarĝo de Dio, solvis la lastajn moralajn katenojn. Niaj bildoj, kiuj certe meritas esti konservitaj por la memoro de niaj posteuloj, ĉu ili ne estas kortuŝanta dokumento pri la senpovo de la okcidenta kristanaro en la glora 20 jarcento! Jes la rusa animo estas malsana! La korpa malsato finiĝos. La anima malsano tamen daŭras, daŭros dum multaj dekjaroj. Ĉu la okcidento fine komencos kompreni tiun situacion? La rusa popolo urĝe bezonas animan resanigon.

Ĉu nia supera bildo ne estas feliĉa simbolo? Ni ne alvoku la armilojn kontraŭ malsana animo! Ni venu kiel la ĉieldevena krista Karito mem, plena de kompato, de zorgo, de simpatio, de konsolo. Ni aŭskultu la feorajn sopirojn, la fortajn korbatojn de tiu malsana giganto, batita kaj sanganta el mil kruelaj vundoj. La granda kompreno, la amoplena helpado, la komuna preĝo, jen la apostola vojo por resanigi la malsanan animon de Ruslando. Orientemo.

# Vladimir Solovjev.

## Pioniro de la Reuniĝo en Rusujo.

Ĉiuj katolikaj ĵurnaloj kaj revuoj, ĉiuj samkredanoj, kiuj havas en koro misian senton, pli zorge ol iam sin okupas pri la „konvertiĝo“ de la vasta Rusujo. „Konvertiĝo“. Jen estas vorto, kiu tute ne plaĉus al Vladimiro Solovjev, fervora pioniro de la reuniĝo en Ruslando, fine de la lasta jarcento, kies influo en la religiaj rondoj rusaj estas ankoraŭ nuntempe multgrava, kaj pri kies originalaj ideoj mi intencas paroli, ĉar post multaj eminentuloj mi opininias, ke la Solovjevaj ideoj multinfluos la nuntempajn kristanojn rusajn rilate al ilia reuniĝo kun la Roma eklezio.



Infanoj mortintoj pro malsato.

Vladimir Solovjev naskiĝis en Moskvo, la 16an de Januaro 1833. Li estis la dua filo de la unua kaj multlaborema historiisto de Rusujo: Serge Mikhajloviĉ Solovjev. Per sia patrino li estas ano de la familio de la bonkonata ukrajna filosofo Skovorod. La gepatroj de Vladimir Solovjev estis kompreneble „ortodoksaj“, kaj lia avo estis eĉ pastro ĉe la rusa eklezio. Sed baldaŭe la juna Solovjev ne plu partoprenis la diservojn. Per siaj legaĵoj li fariĝis materialisto, kiel la plimulto de siaj junaj samtempuloj. Je la deksepa jaro, li estis leginta le verkon de Spinoza; ĉi tiu rivelis al li la spiritualismon. Nova horizonto sin monstris al la juna Vladimir. De tiu tempo datumas liaj esploroj por eltrovi la Veron, esploroj laborplenaj, kiuj estis finvenigontaj lin al la tuta posedo de la sola Vero.

Sed Solovjev ne estis egoista; li ne volis sole ĝui siajn eltrovojn, sed profitigi ilin al kunvivantoj. Li havis apostolan koron, kaj pro tio li elektis profesorecon. Jam de komenco, liaj unuversitataj kursoj, liaj konferencoj havis grandan eĥon ĉe la rusa intelektaro, tiam dividita en du partoj: la liberala aŭ okcidentalista kaj la naciista aŭ slavista. La unua, rigardante ekster la ruslandaj limoj al la okcidento, volis enkonduki la „modernan“ civilizon en Rusujn aŭ pli ĝuste kion li opiniis esti la civilizo, t. e. la liberalismo. La slavista partio kontraŭe celis tute fermi la limojn de Rusujo al la eŭropaj ideoj kaj konservi la antikajn morojn kaj ideojn de l' antaŭaj jarcentoj. La unua estis tro progresema, la alia estis tute konservema. Solovjev stariĝis inter ĉi tiuj du ekstremoj kaj tiamaniere altiris al si persekutojn de la ambaŭ flankoj, ĉefe pro siaj katolikemaj ideoj pri la kristeklezio.

La influo de Solovjev ne povis resti entenigita per la limoj de Rusujo, kie ĝi baldaŭe disvastiĝis; tial ĝi tuj preterpasis la limojn de la carimperio. Rapide Solovjev tiris atenton al siaj pensmanieroj en Eŭropo. Tiam la rusa eminentulo, fervore petata de siaj fremdaj amikoj, plene livenis siajn pensojn al la tutmonda intelektaro per sia ĉefa verko „Rusujo kaj la universa eklezio“, kiu estis franclingve verkita kaj en Parizo eldonita dum la jaro 1889. La rusa censuro ja estus neniam permesonta eldonon de la verko, multe „danĝera“ por la ortodoksa eklezio.

Laŭ Solovjev, Kristo fondis eklezion universan, supernacian. Nuntempe ĉi tiu kristeklezio konsistas el la latina kaj orienta eklezio. La protestantaj sektoj, eklezioj plene naciaj, ne apartenas al la universa eklezio; ili perdis la signojn de tutmonda eklezio.

La sole veran eklezion direktas monarkestraro, starigita de l' Kristo mem, kiu laŭ la Sankta Skriboj kaj la patroj postulas:

1e la primatecon de S. Petro, kiel daŭra institucio,

2e la nereformabeblan magisterin de S. Petro,

3e la dian helpon, por ke ĉi tiu magisterio estas senerara.

Ĉi tiuj pensoj ŝajnas kvazaŭ naturaj al ni, kiuj naskiĝis kaj estis edukitaj en katolikaj familioj, sed post pliatenta pripenso oni ekkomprenas la langdaŭran vojon trairitan de la verkisto, ĉar estas nur post multe da tempo, preĝado kaj stutado, kaj multaj pensoj, eĉ la plej bonaj kaj talentohavaj, kiuj naskiĝis ekster de la katolikaro, fine komprenis la malverecon de ilia eklezio.

Sed la originaleco de Solovjev kuŝas en sia kompreno de la interna situacio de la rusa Eklezio, rilate al la vera Kredo. Ĉu la tuta rusa Eklezio estas skisma sekto, ĉu ĝi tute ne apartenas al la Kristeklezio? Antaŭ ol respondi la demandon, la fervora pioniro de la reuniĝo apartigas la administraciajn kaj instruantajn aŭtoritalulojn de la popolo. Li dividas la ruslandan eklezion en du partoj: unuparte la episkoparo, la intelektuloj, kaj aliparte la simplaj fideluloj, la popolo. Nur la unuaj estas formale skismuloj, la aliaj bonkrede aliĝas. Ne la tuta do rusa Eklezio staras ekster de la kristeklezio. La popolo estas ortodoksa kaj ne kontraŭkatolika, ne skisma. Gi nescias la plenan dogmaron de l' Eklezio, sed ĝin ne kontraŭbatalas. La popola Kredo ne estas klare esprimita, formale definita. Gi kredas konfuze ĉion kion ni klare kredas. Sufiĉas, ke la popolo prezise formulas sian Kredon por fariĝi katolika, sen forĵuro, sen forlaso de nenia ideo ĝusta de sia religia estinto.

Do la plimulto de la rusaj kristanoj, laŭ la penso de Solovjev, ne bezonas konvertiĝon. Ili estas en la sama dogma stato ol la antaŭjarcentaj kristanoj. Ilia dogmaro ne klariĝis. Ili neesprimite kredas la samajn dogmojn ol ni, katolikoj. Sufiĉas ke ili aliĝas al la dogmoj definitaj de la Supera Paŝtisto, depost ilia disigo, por ke ili fariĝas vere anoj de la katolika Eklezio.

Solovjev malŝatas la forĵuron, kiu ŝajnas je forlaso de religio antaŭe sekvata. Nu la kredo de la rusa popolo estas la sama ol la katolika kredo. La religio de la rusaj simplanimoj estas tiu-ĉi de l' Kristo. Ili apartenas al la universa Eklezio fondita de Jesu-Kristo. Ili ne estas herezuloj.



La forigo de la mortintoj.

Kvar jaroj antaŭ sia morto, la rusa eminentulo plene aliĝis al la Romkatolika Eklezio, en la preĝejo Nia Sinjorino de Lourdes en Moksvo*). Fidela al siaj ideoj, li ne faris ĝuste diritan forĵuron; li nur solene konfesis sian kredon tiumaniere:

„Kiel membro de la vera kaj respektinda ortodoksa Eklezio orienta aŭ grekorusa, kiu ne parolas per kontraŭkanona Sinodo, nek per oficistoj de ŝtata registraro, sed per siaj gloraj Patroj kaj Doktoroj, mi akceptas kiel superega juĝanto, pri religiaj demandoj, tiun, kiun akceptis tiamaniere S. Ireneo, S. Dionisio la Grandulo, S. Atanasio la Grandulo, S. Johano Krisostomo, S. Cirilo, ktp. nome la Apostolon, S. Petro, kiu daŭre vivas en siaj posteuloj, kaj kiu nevane aŭdis la vortojn de l' Sinjoro: Vi estas Petro, kaj sur tiu-ĉi roko mi konstruos mian eklezion. Firmigu viajn fratojn. Paŝtu miajn ŝafojn, paŝtu miajn ŝafidojn".

Nuntempe, dum la revolucia blovo ŝanceligas la ortodoksan eklesion, la bonvolaj animoj pripensas la universan Eklezion de l' Kristo kaj rigardas al tiu roko, kiun ne superfortos pordoj de la inferoj. Kio malkunigas ilin? Ĉu ili ne estas kristanoj, ĉu ili ne havas la saman kredon, la samajn Sakramentojn? Ili rememoras la pensojn de la fama antaŭjarcenta pioniro de la Reŭniĝo: Vladimir Solovjev, kaj estas preskaŭ pretaj aliĝi al la Romkatolika Eklezio, la sola kiu staras malgraŭ la ĉiuspecaj persekutoj. Nur malnova antaŭjuĝo ilin haltigas. Ili deziras fariĝi katolikaj, sed ili ne volas forlasi la orientan riton. Ili bonvole konfesus la katolikan Kredon, sed neniel volas forĵuri la slavan Eklezion. Ĉi tiu „forĵuro" ŝajnas por ili rompo kun la pasintaj religiaj tradicioj.

Antaŭ ĉi tiu vorto: „forĵuro", ili hezitas antaŭenmarŝi. Ĉu la eklezia leĝaro, ĝis nun aplikata, ne povas esti plilarĝe komprenata? Ĉu kredokonfeso simila al tiu farita de Solovjev ne sufiĉus? Ne apartenas al mi respondi, sed mi opinias ke la demando estas pripensota, ĉar de ĝia solvo dependas la reveno de tuta popolo al la vera Eklezio.

Vladimir Solovjev mortis en 1900, post laborplena kaj sankta vivo. Li semis konstante siajn ideojn por la Reŭniĝo de la orienta kaj latina Eklezioj. Post dudek jaroj la ĝermoj kreskas kaj jam ekfloras. Ĉu ni vidos la maturecon kaj ĉeestos la rikolton? Dio ĝin donu. Max Roub.

---

*) atesto de l' Pastro Tolstoj, en la franca ĵurnalo: L' Universo, 9. Sept. 1910.

# LA REVUO

La unua numero de „revuo“ aŭ pli bone „revueto“ eliras, modestege, sen bela, nobla eksteraĵo! Ne estas nia kulpo! Ankaŭ ne via, karaj legantoj! La realeco nuna estas la senkulpa kulpo: la ekonomia mizero, kaj — diru ni malkaŝe! — parte la senintereso, la nesufiĉa unueco en niaj propraj rondoj! Sed antaŭen!

„Revuo“ devas estiĝi bele ilustrita, multpaĝa gazeto, kiu raportos pri la religia, socia, kultura agadoj, pri literaturo, scienco, teatro, pri novaĵoj kaj statistikoj interesaj de la tutmonda katolikaro. Revuo volas ankaŭ publikigi belajn poemojn, kantojn, ĉefe bone tradukitajn himnojn liturgiajn!

Jen la programo! La realigo dependas de vi, de via mono, de via kunlaborado! Kuncentrigu ni fine ĉiujn fortojn, ke ni havu indan gazeton, inda de katolika nomo, inda de nia sankta tasko, inda de ni mem!

**R. K. aperas kiel aldono al K. M. Oni povas ĝin tamen aparte aboni. Tiam la prezo provizore estas la duono de abono por K. M. Volonte ni disponigos spacon por mallongaj, precisaj raportoj pri la tutmonda katolika Esperanto movado sen iu diferenco. Grupoj mendantaj plurajn ekzemplerojn sub sama adreso havos specialan rabaton.**

**LA REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO**

## El la movado.

Inter grandaj krizoj, internaj kaj eksternaj, Ika naskiĝis; inter grandaj krizoj ĝi evoluiĝis dum la lastpasintaj jaroj: Dank' al la ofte videbla helpo de la bona Dro tamen la evoluo estis feliĉa, tiel interne, kiel eksterne.

Interne ĝuste la diversaj diskutadoj kun samcelanoj au similorganizaj movadoj alportis feliĉan klarigon pri la celoj kaj taskoj kaj la plej taŭga organiza formo de Ika. Tial ni povas esperi, ke, okaze de direktorara kunsido dum nia kongreso en Konstanz estos la kunvena tempo, kiam oni sukcecos, post la spertoj de tri jaroj, post plej diligenta studado kun autoritataj personoj, fiksi klaran statuton kaj regularon de Ika.

Hodiaŭ mi tamen volas raporti pri la ekstera evoluo, kiu nun estas plej feliĉa. Tio plej bone estas pruvata per la starigo de la naciaj sekretariejoj kaj komitatoj.

En Svisio ekz. per senlaca agado de nia plej ŝatata kunprezidanto estas starigata nacia sekretariejo en Altstetten, gvidata de nia kara samideano J. Bissig. Kvankam la Svisoj jam estas iomete suspektemaj kontraŭ „internacioj“, tamen la laboro bone progresas. Precipe la oficialaj rondoj pli intime amikiĝas kaj estos ankaŭ plejparte oficiale reprezentataj en Konstanz.

Same por Francio estas kreata nacia sekretariejo en Parizo, enkuraĝigata per Lia Kardinala Moŝto kaj la Apostola Nuncio, kiu letere enkuraĝigis nian agadon. La sekretariejo (123 Rue Montmartre) estas gvidata per nia fervorega direktoro Sro Muffang. Dank al la imitinda labora de la nacia komitato, gvidata de nia kunprezidanto grafo de Rougè inter malfacilaj cirkonstancoj la laboro kreskas. Pli ol 20 gazetoj kaj revuoj raportis pri Ika kaj la intereso kreskas precipe en junulaj rondoj. Kun la rondoj de la admirinda pacpioniro Marc Sangnier ni estas enkoraj interrilatoj.

Similan feliĉan evoluon montras la movado en Germanio. Post multaj klopodoj ni sukcesis krei nacian sekretariejon en Paderborn, direktata per dro Ruppert, redaktoro de „Westf. Volksblatt“, por kuncetrigi la tutan germanan Ika-movadon. Li estas fervore subtenata per Sro Sappl, München, Isabellastrasse 40, kiu laboras precipe por Bavario kaj sudgermana parto. Ĉiuj germanaj samideanoj estas petataj interilatiĝi kun unu aŭ alia adreso.

Feliĉa pruvo, ke la ideo de Ika enradikiĝis multege estas en tio, ĉar eĉ la nunaj cirkonstancoj ne povis detrui la organizon. Kontraŭe la 10 grupoj de Ika en Essen ĝuste reorganizas sin finance kaj reekprenas la laboron . . .

Feliaĉj preparoj por kreo de naciaj fakoj kaj sekretariejoj estas faritaj en Italio, kie post la kongreso estos oficiale malfermata sekretariejo; plue Hungario, en Ĉeĥoslovakio (Praha) kaj en Hispanio . . .

Certe la beno de Dro estis kun ni. La malfacilajoj malaperas, la portoj malfermiĝas! Kunhelpu, ĉiuj al la triumfo de la Dia Regno! . . . K. Mayr.

(Daŭrigota.)

Eldonejo: Paulus-eldonejo, Graz, Karmeliterplatz 5. — Posedanto kaj Eldonisto: „Ika“, Graz, Karmeliterplatz 5. — Respondi Redaktoro: Dr. M. J. Metzger, Graz, Karmeliterplatz 5. — Presejo: Paulusdruckerei, München, Isabellastrasse 40.

UNIWERSYT... KUL